GISTO, 0909.
Str. Esperanto,880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por ĉeestaj VK-rondanoj
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00

.....

ETOSO

Eksterordinare ĉarman etoson ĝuis niaj VK-rondanoj la 28-an deAŭgusto. Kunvenis agrabla nombro da neavaraj parolantoj. Se oni malzorgis, ne trovis breĉon por enpafi ideon aŭ demandon. Tio eble okazis pro la entuziasmo de la rondanoj pro la promeso de Karesema, ke ŝi de nun ofte venos gustumi la kafon de nia kunsidejo. Ŝi kunportis kvazaŭ porteblan librejon, por proponi laŭgustajn interŝanĝojn. Ĉi oldulo ricevis T-ĉemizon nepre uzendan. Karesema proponis ankaŭ antecipi la kunsidotempon ĉar ŝi iom troige diras ke, kiam oni eksentas la bonfartigan etoson la arbaruloj jam forlasas la amikaron. Parte mi konsentas, ke oni devus anonci la komencan tempon je la 14,00h. Do, kiu konsentas, pri tio,tiu bv Manifesti sin. La tempo rajdas sur jeto. Oni flanken metas la kaftason kaj transiras somere al biero, aŭ al vino kiam eksterdome la Minuano fajfas ĉirkaŭ TV-antenoj. Amiko Nedio kunportis kaj poponis al ni kelkajn DVD-diskojn, temas pri NIFOJ. La prezo? Nepre reportenda, por interŝanĝo kun alia partoprenanto. Amiko Arno, kiu ĉeestis la UKE en Bialistok havis multon por rakonti.pri sia turistado. Li montris parton de ĵurnalo el sia urbo, kiu montras bildon klakitan en Herzberg, li kaj amikoj, en ĵurnalo el sia urbo. Mankas tempo por rememorigi ĉiujn detalojn.

La kvina p-tagmeze, horo por niveligi spezon ĉe la kaso. Alkuras solidaraj kompanoj, disdividas la fakturon. Sen investo ne okazas prospero. Laŭ mi tia altnivela kaj gaja kunsido estas senpreza. Multaj tiaj devus okazi tra nia kaj aliaj landoj. Koran dankon al ĉiuj!

GEA-ESTRARO.

Al la nova GEA-estraro, kun nia elstare kapabla R. Zaghetto ĉe la rudro, nian fidelan respekton ni ĉiuj proponu kaj manifestu dum ĝiaj iniciatoj. Antaŭen marŝas ni!

TEKO

Direndas ke la teko transdonita al ĉiu partoprenanto de la 40ª BKE, julie 2005 en Porto Alegre-RS, kun iniciativoj de nia vigla Karesema, fariĝis utilaĵo nepre kunportenda objekto ĉiam kiam oni eldomiĝas. Krom daŭre reklami pri nia flegata “bebo” Esperanto, ĝi proponas spacon por dokumentoj, periodaĵoj, skribiloj, ĉekoj kaj etaj aĉetaĵoj. Ke inoj ne ŝatas daŭre uzi ĝin, pravigas sin. Ili preferas surŝultrigi iliajn felan vojaĝkeston, (ju pli grandan des pli ĝi altigas iliajn socinivelon, ĉu vere?). Sed, kial nur pokaj samideanoj uzas ĝin surstrate? Tial ke al ili certe neniam okazis oportuno jena: hejmenvene, lastan monaton, mi sidis kaj legis ĵurnalon, dum mi atendis la minuton por enbusiĝo. Neatendite fremda sinjoro, ĉ.50-jara, najbare sida, alparolis min siamaniere: “vi parolas Esperanto?” – Tuj mi akurate alrigardis la eksteran paĝon de la ĵurnalo. Mi pensis ke li vidis tie ion pri Esperanto kaj respondis ion oportunan sed li tuj rediris ke li ne scias la lingvon, ke li vidis la reklamilon presitan sur la verda teko. De tiam okazis interbabilado. Li sciigis ke lia filino, kiu loĝas en najbara urbo

lernas nian lingvon. Okazis adreso-interŝanĝoj kiuj alie neniam estus okazintaj. Jen do la utilo montri, NE KAŜI nian valoran idiomon, ĉiam kiam eblas, por ligi amikecojn kaj okazojn por semi...semi fekundajn semojn. Vi, inteligentuloj, havos pli da sukcesoj ol ĉi oldulo !

LA VIVO KURTAS

Junaj, la homoj ignoras la tempon kaj perdas orajn oportunojn por konkeri pli altan bonstaton, pro neglekto kaj pigro. Je la aĝo 26j. mi vekiĝis. Dum pluraj jaroj mi konsideris min atinginta la apogeon de mia kariero kaj nur ĝuis la junecon. Tiutempe mi flugis ĉe Varig, kiel radiotelegrafisto/navigisto. La aeronautika regularo ebligis kalkuli trionojn de la de mi flugintaj horoj, kvazaŭ mi mem pilotis aviadilojn, kun la celo akiri la karton de LA-piloto, (Aerlinia Piloto).En la flugo iam tiam okazis ke RT povis trejniĝi pri pilotado, kun alesto de la komandanto. Certagrade tio okazas, por ke en ekstrema okazo la aviadilo kaj pasaĝeroj povos sendifekte atingi la teron. - Mi komencis flugi en pilota lernejo ĉe Ŝarlaŭ kaj plenumis ĉ. ses horojn, en malgrandaj avioj, ĝis min trafis la informo: vi estas tro olda, vi ne plu interesas al nia Entrepreno. Jen mi, antaŭ trista elreviĝo. Pento ne riparas erarojn. Do jen, miaj karaj, la estorieto kiun vi povos rakonti al viaj genepoj, por sproni ilin al tempoŝpara vivo. Karaj geamikoj, mi invitas vin surpaperigi iom el viaj karieroj (resumo ne pli longa ol 10 linioj) kaj ensendi ĝin, por publikigo en Gisto. Mi antaŭdankas.

REAGOJ

Kiam la temoj proponataj al legantoj ne estigas reagon, tio signifas ke la verkinto ne kapablas verve pritrakti la tekstojn kaj tial ĝi ne indas la legadon. Tio okazas far pokaj esceptoj (Zaghetto, Cezar, Solon, Karesema...) inter la Gisto-legantoj. La verkinto celas entuziasmigi la samideanaron sed, se li ne sukcesas, malgraŭ klopodoj, laŭ mi, alia homo pli kapabla devus suŝultrigi la pianon. Mi daŭras tamen ĉe la penso ke multaj legantoj, pro la lingvaĵo uzata,(kunmetaĵoj) ne komprenas 100% la enhavon de nia verda periodaĵo. Domaĝo! Tiucele helpus plani la orkanizadon de engrupa legado, kun samtempa klarigo, por ke ĉefe vortkunmetoj fariĝu klaraj. Praktikado perfektigas. Ni prenu ekzempleron: iam mi ie legis la vorton ANTAŬENA MARŜO. (kia marŝo?) La kunteksto ja helpas deĉifri la signifon, tamen komencantoj stumblas kontraŭ ĉi nekutima vorto. Veterano ne dubas: **ANTAŬEN+A. –** Se la rondano dubas pri la ĝusta signifo de vorto uzata, li/ŝi prononcas ĝin nur mallaŭte, por lasi marĝenon ke la aŭdantaro pensu ke okazis misaŭdo. Tiaokaze mankas memfido kaj flueco en la babilado.

Ĉu Ridi?

Vendistino al aĉetantino :pardonon pro mia rimarko, via bankbileto estas tute malseka, kio okazis al vi?
- Okazas ke mia edzo malsekigis ĝin. Li larmis kiam li enmanigis al mi la monon.

PARADEMO

Atleto diligente kulturadis sian fizikan aspekton, eĉ per neleĝaj ingrediencoj. La muskoloj superis tiujn de kolegoj. Li paradis antaŭ geamikoj dirante ke li estas dinamitviro. Baldaŭ li havis amatinon kaj kun ŝi vizitis motelon. Depreninte la ĉemizon li snobe montris siajn avantaĝjan brustajn kaj femurajn muskolojn kaj aldiris: muskolojn, 120 Kg da dinamito. Fine li deprenis sian kalsoneton. La ino tuj forkuris tra la motelaj koridoroj kaj kriadis “fuĝu...tuj fuĝu el la motelo, mia ĉambro plenas de dinamito kaj la meĉo estas tre kurta!”